Nové publikace: V nejbližší době vyjde propagační b r o ž u r a se známým českým textem o Esperantu. Aby mohl býti hrazen náklad alespoň 8—10.000, budou do této brožury přijímány inserty za ceny: 30 K 1/1 str., 16 K 1/2 str., 9 K 1/4 str., 5 K 1/8 str. — Současně byly vydány nové o b á l k y s českým informačním textem o Esperantu. Cena 50 ex. 40 h (vypl. 50 h). — O d z n a k Esperantistů lze obdržeti ve dvou velikostech: průměr 18 mm (70 h vypl.) a 10 mm (50 h vypl.).

Vyšší **zkoušce z Esperanta** podrobila se dne 6. ledna s prospěchem velmi dobrým sl. Mila Bartáková z Humpolce. Přihlášky ke zkouškám v termínu velikonočním přijímá a zkušební řád zašle Ekzamena Komisio de B. U. E. v Praze II. Vodičkova ul. 38.

Sl. městská rada v Karlíně, vyhovujíc žádosti o **subvenci** na vydržování informační kanceláře, povolila k tomu účelu usnesením ze dne 23. list. 1910 částku 100 korun. Štědrým dárcům byl vzdán uctivý dík.

Český Zemský Svaz ku povznesení návštěvy cizinců v království Českém vyhradil ve svém ústředním výboru místo pro **zástupce** našeho Ústředního Svazu B. U. E. Delegátem jmenován p. prof. dr. V. Rosický (náhr. red. Č. Č. E.), který ve schůzi dne 24. října upozornil na výhody, které výše jmenované korporaci přinese užívaní Esperanta ve styku s cizinou a při informaci o naší vlasti.

Na **Zamenhofův fond** přispěli: Klub Esperantistů v Trutnově 700 h, p. A. Helbich v Litomyšli 115 h, p. A. Brandejs, farář ve Zl. Koruně 300 h, p. B. v Praze 100 h, p. V. C. 1000 h. Celkem dosud odvedeno 55.971 h (559 K 71 h). Upřímný dík!

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

PRAHA. Bohema **Propaganda** Societo Esperantista malfermis en la kancelario kelke da kursoj, en kiuj instruadis s-oj: J. Pech, Alex. Zahel, V. Veverka kaj Ed. Kühnl. Ĉiu kurso daŭris 14 horojn, kaj havis krom en la supera po du horoj semajne; kotizaĵo 2 K. Samloke instruas s-o Türk en kurso de „**Stelo de Espero**“. En **Studenta Rondeto** E. gvidas la kurson s-o prof. dr. V. Rosický. Kunvenoj de E. K. en **Praha** „u Donátů“ okazas nun ĉiun vendredon vespere. Esperanta konversacio. Ĝenerala kunveno okazos la 10. feb. en la kluba kunvenejo. Ĉiuj membroj estas urĝe petataj tuj redoni ĉiujn librojn prunteprenitajn el la biblioteko. — E. K. en

Smiohov havis la 26. jan. ĝen. kunvenon, kiu elektis s-on dr. Tille kiel prezidanton, s-on J. Podlipský kiel sekretarion. Kursoj gvidataj de s-o Rohan donis la plej kontentigan rezultaton. La biblioteko enhavas 65 librojn. Estis eldonita poŝtkarto kun bildo de la membraro. Sume estis ekspeditaj 140 leteroj. Kunvenejo: „Národní dům" (merkredo). — Studenta R. E. en **Karlín** malfermis la 15. okt. kurson en la rest. „U bílého lva" (sabato 4—5 h). Inf.: Poděbradova ul. 418. — E. K. en **Žižkov** estas unu el la plej agemaj: la 11. dec. 1910 kunvenis la membraro kaj multe da gastoj por amuziĝi ĉe bela programo en hotelo „Vodák", kaj por la 4. februaro invitas nin jam novaj afiŝoj; kursoj por komercantoj okazas mardon, por progresintaj vendredon vespere de post la 18. kaj 20. jan. en la kluba sidejo (nun restoracio en Husinecká ul. 6). Kotizaĵo 2 K. La klubo projektas fondi esper. muzikistan grupon. Ni ĝoju, ke baldaŭ ĉe niaj festoj aŭdiĝos la esperantaj komponaĵoj. Estu aldonite, ke ĉiuj entreprenoj de la klubo rezultigas profitkalkulon, danke la oferemon de la aranĝantoj. — E. K. en **Praha VIII.** organizis belan nikolaan feston en dec. 1910. Regulaj kunvenoj merkrede. En kafejo „Palmovka", kie bohemo-esperantaj afiŝoj anoncas „Hodiaŭ koncerto", estas starigita gastotablo: ĉiun dimanĉon kunvenas tie samideanoj en Libeň kaj el ceteraj kvartaloj, uzante dum la gajaj kunvenoj sole Esperanton. — E. K. en **Kr. Vinohrady** eksiĝis el B. U. E. kaŭze de malĝustaj informoj vastigataj inter la membraro. Tiu ĉi decido aprobita de 10 personoj el 13 ĉeestintaj, do neunuvoĉe, ĉe la eksterordinara kunveno, kiun plimulto de la membraro ne ĉeestis, estis interalie bazita sur malprava akuzo, kvazaŭ delegitoj de la klubo en Vinohrady estis ofenditaj ĉe la ĝen. kunveno de B. U. E. en marto 1910. La tridek tiame ĉeestintaj delegitoj, kiuj unuanime voĉdonis kontraŭ propono prezentita de la K. en Vinohrady bone memoras kaj povas atesti, ke kontraŭe la tuta ĝen. kunveno de B. U. E. mem estis grave ofendita de unu el la oficialaj delegitoj de la K. en Vinohrady. La forestinta plimulto de membraro de la K. en Vinohrady ne konsentas kun la eksiĝo el B. U. E., inscenita de konataj „samideanoj". — „Evangelická jednota" en Praha I., Žižkov kaj Smíchov malfermis kursojn pri E.; instruas s-o Šťovíček. — Dum libertempo de la pasinta jaro parolis pri E. antaŭ la lernantoj de la instruista kurso ĉe la boh.-slava komerca akademio en Praha red. de Č. Č. E. — En la lasta tempo vizitis la esperantistajn klubojn en Praha kelke da fremdlandaj samideanoj inter ili: s-o bar. Eickstedt el Halberstadt, s-ino Kamilla Fürth el Dresden, s-o Alf. Agache, arĥ. el Parizo, s-o W. Tricke el Bremen, s-o Jos. Kubik el New-York, s-o J. W. Eggleton el Haubinda, s-o Joh. Pour el Düsseldorf, s-o Dr. Wil. Róbin el Warszawa, ges-oj Lamborot-Perny kaj f-ino Fischer el Châlon-sur-Saône, s-o H. J. Hoen el Ettelbruck, f-ino Ch. Pulvers el Basel k. a. — Bonega propagandilo estas la esperanta titolo de nova, moderna hotelo „Zlatá Husa" sur placo Václavské nám. Inter dudek lingvoj eŭropaj paradas tie ankaŭ la esperanta surskribo „Hotelo Ora Ansero". — Kancelario de la ŝtata „loterio por subteni la vidvinojn post la poŝtoficistoj" korespondas esperante kaj inter la oklingvajn tekstojn sur siaj lotbiletoj (po 1 K) ĝi metis ankaŭ la tradukon en Esperanto. Ĉiun Esperantiston ni atentigas pri la „esperanta domo" de s-o J. Podlipský en Smíchov (Plzeňská tř. Lidová drogerie). Sur la muroj de ŝtuparejo kaj de la koridoro oni trovas bele skribitajn poemojn esperantajn

kaj preskaŭ 40 trafe elektitajn proverbojn, kiel ekz.: „Malfermita kelo tentas al ŝtelo". Alia „esperanta domo" apartenanta al s-o E. Batěk ekzistas en Říčany: sur „villa Helenka" granda stelo kaj esperantaj surskriboj atentigas pri nia lingvo la pasaĝerojn de preterveturantaj vagonaroj. — Lumbilda reklamo por E. estas videbla en la kinematografoj „Elite" en Poříč kaj na „Knížecí" en Smíchov. Portreto de nia Majstro, adreso de B. U. E. kaj de „Verda Stelo" tre bone servas sian celon.

De post la lasta „Beseda" en 1910 „U Brejšky", kiu estis vere esperanta amuzado, okazis neniu nova simila kunveno. La proksima, projektata por februaro, estos anoncita per la ĵurnaloj.

La II. kunveno de Esperantistoj el **orienta Bohemujo**, pri kiu ni parolis jam en la 9-a n-o 1909, okazis la 8. de decembro en Pardubice kaj estis vizitita de 80 samideanoj el ĉirkaŭaĵo. La amuza kaj instrua programo daŭris ĝis malfrua horo kaj kontentigis la gastojn same kiel la organizintojn. Nova simila kunveno okazos en Hradec Králové. — La unua esp. centro bohema en **Silezio**, la E. K. en **Radvanice** havis dum la pasinta jaro 56 membrojn. El la raporto prezentita al la ĝen. kunveno (8. jan.) ni citas: Per 50 artikoloj senditaj al la regionaj redakcioj oni sukcesigis la propagandon; pli multe ol 200 leteroj estis forsenditaj. Estis aranĝita kurso elementa kaj supera, amuza programa vespero (15. okt.) kaj parolado de s-o Dvorník pri Dr. Zamenhof kaj lia verko. En la kluba biblioteko plejparte troviĝas libroj donacitaj de la membraro. Unuanime estis elektitaj Dr. L. L. Zamenhof kaj red. Č. Č. E. honoraj membroj. La nunjaran kongreson en Praha partoprenos ankaŭ delegitoj de tiu ĉi fundamenta ŝtono de esperanta movado silezia. Prezid. de la klubo estas elektita s-o Rud. Ryboň en Malé Kunčice 31, sekr. s-o Fr. Dvorník en Radvanice. En librovendejo de firmo Král estas starigita Silezia esp. konsulejo. Du gazetoj alportas la klubajn sciigojn. — Tre bona novaĵo estis al ni sciigita de s-o instr. K. Krolmus el **Chrštin**: la 15. okt. li komencis instruadi pri E. 25 lernantojn el ĉirkaŭaĵo, precipe el **Uhy**. La kursoj okazas en la lernejo. Dum la unuaj ses semajnoj pruviĝis, ke la kursanoj fariĝos post duonjaro da studado perfektaj Esperantistoj kaj ili konfesas, ke neniu alia rimedo povus tiel forte ekinteresi kaj ekokupi ilin, kiel E. Per la sukceso entuziasmitaj ili projektas fondi la unuan boheman grupon de gelernantoj (B. U. E.) kaj aranĝi printempe publikan ekzamenon sub protekto de la inspektoro kaj aliaj influaj personoj. — En **Velvary** vizitas la kurson 15 personoj; kvankam ne ĉiuj estas same kleraj, tamen ĉiuj preskaŭ egalrapide sukcesas. — E. K. en **Louny** reelektis en sia dua ĝen. kunveno la 7. jan. s-on J. Kolmistr prezidanto, s-on Č. Kubík vicprez., s-ino M. Černá sekr., s-on Dušek kas. La tria elementa kurso malfermota je komenco de feb. — Kursoj de s-o prof. Pitlík en **Prostějov** povas esti nomataj la unua grava sukceso de E. en tiu ĉi moravia urbo: kiel ni jam diris, vizitas ilin 20 knabinoj kaj 59 knaboj, same kiel la ceterajn kursojn de vivaj lingvoj en tiu ĉi komerca lernejo. Nia senlaca samideano projektas ankoraŭ kurson publikan. Ni sincere gratulas lin kaj ĝoje atendas sciigojn pri novaj sukcesoj! — Paroladon pri E. de s-o Taimr la 4. okt. en **Česká Skalice** partoprenis 40 gastoj. En la kurso instruas s-o Fr. Balíček el Červený Kostelec. — **Rakovník.** Regularo de la K. estis aprobita kaj aliĝis jam pli multe ol 50 lernantoj. Inter membroj de la prepara komitato estis elektitaj s-oj Černý, prez kaj M. Hlaváček, sekr. S-o Černý instruas en la multe vizitata klubo. Liaj artikoloj en

„Rakovnický Kraj“ faciligas rimarkinde lian propagandan laboron. — Bohema K. E. en **Wien** malfermis la 28. okt. ekspozicion esperantan de gazetoj, libroj, muzikaĵoj, il. kartoj, fotografaĵoj, leteroj, prezaroj k. s. en „Národní dům“ (Turnergasse 8), kiun vizitis 300 personoj. Inter la membraro ni vidas plezure s-on Boh. Davídek, kies ŝatinda helpo en la laboroj de niaj kluboj en Praha estis perdita pro lia translokigo Wien'on. Danke la rilatojn de prez s-o K. Macháček kun bankoficisto Hovhannisjanc el Tabriz en Persujo presigos ĉi tiu en Wien il. kartojn kun esp. teksto por disvastigi nian lingvon, en Persujo, kie ĝi estas konata jam sur ok lokoj. — E. K. en **Tábor**. En la nova, tria kurso, instruas s-o Jos. Jež 30 lernantojn. Dufoje semajne kunvenas tie la samideanoj: dimanĉon en la knabina industria lernejo, mardon por interparoladi en hotelo „Nový“. Dum la libertempo perdis la klubo sian fondinton, fervoran pioniron de nia ideo, s-on R. Ez. Cikhart, kiu estis translokita; baldaŭ eble ankaŭ s-o Jež forlasos la samideanojn. — E. K. en **Kutná Hora** invitis per dulingvaj programoj al bela festo, okazinta la 10. dec. en „Měšťanská Beseda“: La nikolaa amuzo kun donacoj estis tre sukcesplena. Inter la programpecoj estis kelkaj esperante prezentitaj. La unuakta komedio „Per Esperanto“ de W. M. Pace, trad. el la angla lingvo de f-ino M. Mrázková, sekretariino, estis „ora najlo“ de la vespero. En la klubejo „U žlutého kola“ okazis la 16. jan. ĝen. kunveno. En feb. malfermota nova kurso en la lernejo de Komenský. — E. K. en **Č. Budějovice**. Nova kurso de s-o F. K. Svačina komenciĝis la 5. okt. Alia kurso malfermiĝis en la virina industria lernejo por la lernantoj. Kiel konate, estis ĉi tie la unuan fojon instruate pri E. en la lernejo kiel pri la ceteraj objektoj. Nia movado ŝuldas grandan dankon al s-o Svačina por tiu ĉi rezultato de konstanta klopodo. — E. K. en **Praskačka** perdis unu el siaj plej agemaj membroj s-on instruiston J. Jeřábek, kiu nun estas anstataŭata en sia ofico kaj same en la propagando de s-o instr. Novotný. Li mem deĵorante nun en Zábřeh/O. en Moravio, trovas vastan kampon por nia afero: en proksima urbo Vítkovice li gvidos kurson kaj ĉe okazo de regiona ekspozicio en Příbor li aranĝos la esperantan sekcion. Ni ne miros, se lia nova klubo estos baldaŭ anoncata. — Membro de E. K. en **Vítkovice** s-o Janečka redaktas esp. rubrikon (kurson) en la gazeto „České illustrované noviny“. — E. K. en **Golčův Jeníkov** kunvenas merkrede en rest. „U Horáka“. Prez. s-o M. U. Dr. Sedláček, sekr. s-o J. Jindřichovský. — Membro de E. K. en **Pardubice** s-o M. U. Dr. Schulhof ĵus eldonis kolekton da 10 originalaj poemoj esperantaj sub titolo: Per espero al despero. La libreto kostas 60 hel. kaj ni sincere ĝin rekomendas. Serion da tre bonaj informaj artikoloj publikigis s-o Dr. Schulhof en „Osvěta Lidu“. E. K. en **Písek**: Kurso elementa malfermita la 4. jan. En la knabina komerca kaj industria lernejo estis malfermita kurso por lernantinoj, da kiuj multe enskribiĝis. — E. K. en **Mladá Boleslav**: En la kurso instruas s-o J. Moucha. Kunvenejo: „U Tůmů“. — Bone progresas la kurso de f-ino Überhubrová en **Stráž**. — Laŭ sciigo de s-o Košek estis aranĝita en **Bytouchov** ap. Semily kunveno la 21. jan. por fondi klubon. En la kurso vizitata de 19 personoj instruas s-o Nožička; duono de ili bone jam E-on posedas. La intereso promesas garantii al E. gravan pozicion. — E. K. en **Vsetín** en Moravio malfermis en decembro merkredan kurson (6—8 h vesp.) en la estinta lernejo. La unuan merkredon de ĉiu monato estas speciala kurso por instruistoj (8 10

vesp.); kotizaĵo 1 K, por nemembroj K 2·40. Membroj de la klubo pagas jare K 2·40; riĉa biblioteko disponebla dum ĉiu leciono. Supera kaj konversacia kurso ĉiun ĵaŭdon 7-8 vesp. Sin turni al s-o direktoro J. Zlámal. — **Nymburk**: La paroladon de s-o J. Šilhart (8. okt.) en hotelo „U Města Prahy" partoprenis cent personoj. La 11. okt. estis fondita kurso kun 39 lernantoj. La kurso (8—10 vesp.) daŭros 3 monatojn. Instruas s-o J. Šilhart, kiu ĝis tiu ĉi tempo senlace laboris por nia afero en Trutnov. La fondanta ĝen. kunveno okazis la 29. jan. en hotelo „Horák". En feb. komencos instruadi s-o J. Šilhart en nova kurso. Multe da intereso estas vekita por E. ankaŭ en la ĉirkaŭaĵo: kluboj fondiĝos en **Libice n. C.** kaj en **Časlolovice.** En ambaŭ estas kursoj bone progresantaj. — E. K. en **Kladno**: La 25. dec. parolis pri E. s-o E. Batěk el Říčany. Bonega rezultato vidiĝas en la multnombre vizitataj kursoj (elementa en lernejo, ĵaŭde, supera en „Konvikt" dimanĉe); 25 membroj enskribiĝis en la adresaron de B. U. E. La urbestraro donacis por subteni la laborojn de la klubo 50 K. — En **Č. Kremže** en gastejo de s-o Stožický instruas ĉiun dimanĉon 15 lernantojn s-o Tomáš Plánský. La kurso, malfermita la 16. de oktobro, plene kontentigas la partoprenantojn, kiuj por plua perfektiĝo en E. fondos klubon. — En **Kardašova Řečice** propagandas E-on s-o Boh. Klaška, abs. de komerca lernejo. -- En **Libštát** ap. Lomnice n. P. nova rondeto anoncata de s-o J. Halíř. — Ĝen. kunveno de E. K. en **Trutnov** la 19. jan. elektis s-on Fr. Dvořák prezidanto, s-on Jos. Friba sekr., s-on J. Ždanský kasisto. — E. K. en **Kukleny** preparas ĝen. kunvenon kaj amuzan vesperon. Kunvenejo: Hotelo „Černý kůň" merkrede, vendrede. — S-o Boh. Zadák el Komárov ricevis permeson de la komitato de ekspozicio okazonta en **Příbram** (15. jun. — 15. jul. 1911) aranĝi sekcion esperantan. Nun li gvidas dufoje semajne kurson en la Rondeto E. en Příbram. -- E. K. en **Roudnice** malfermis vesperan kurson la 18. nov. en la lernejo: 1 K (por nemembroj 2 K). Kunvenoj de klubo kun konversacio mardon vesp. en rest. „U Hedánků". La 16. okt. parolis pri „E., ĝia signifo kaj triumfo" s-o K. Procházka el Praha en hotelo „Pošta". En „Podřipan" bonaj propagandaj artikoloj. — En **Rataje n. S.** gvidis kurson s-o instr. R. Faukner. Post la kurso li aranĝis paroladon pri E. — En **Čáslav** montriĝas bona kampo por kurso, ĉar lernantoj de gimnazio kaj de seminario interesiĝas pri E. — Ekslernantoj de s-o Dr. Šípek, kiu dum vintro loĝas en Kairo, kunvenas daŭre en **Luhačovice** kaj intencas verki gvidlibreton pri la banloko. — E. K. en **Liboc** aranĝis la 11. dec. bohemian teatran prezentadon: Selské námluvy. — Post foriro de f-ino J Šupichová instr., el **Červený Kostelec** koncentriĝis la propagando en manoj de nia samideanino s-ino Berta Kejzlarová, kiu aranĝas ĉiun merkredon je la 7 h. vesp. kunvenojn en sia loĝejo. La 28. dec. post parolado de f-ino Šupichová pri evoluo de E. sekvis samloke recitaĵoj, kantoj kaj muziko. La membroj de tiu ĉi rondeto partoprenos nunjare la esp. konferencon aŭstrian. F-ino Š. daŭrigas kurson kun ili skribe. — En **Chvalkovice** estas fondita grupo, kiu organizis jam kurson kaj amuzon kun esp. ekspozicio ĉe kiu s-o instr. Alb. Neužil parolis pri E.

BIBLIOGRAFIO.

Novaj gazetoj: *Internacia Medicino,* oficiala monata organo de Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio, kies membroj ĝin ricevas

senpage. Abono jare 3 Sm (K 7·20). Por kluboj jare 1 Sm, se ili pagos antaŭ la 15. II. 1911, Ĉefredaktoro Prof. Dr. H. Dor. Eld. Ad. Thalwitzer, Kötzschenbroda-Dresden (32 pĝ. 16 × 23). — Ĉe la sama eldonejo eliras: *Internacia Scienca Revuo.* Malnovaj jarkolektoj 1904—1909 po 2 Sm (po K 4·80). Nova abono Sm 2·75. Ĉiu klera Esperantisto utile legos kaj studados la mirinde riĉan trezoron de esperanta scienco. *Anti-alkoholisto internacia.* monata; red. dr. J. Hanauer, Bruxelles. Jare 1 Sm. - *Danubo,* monata, esperanta organo de la rumanaj kaj bulgaraj Esperantistoj. Red. adm. Bucuresti, 5. str. I. C. Bratianu (32 pĝ. 16 × 24). Jara abono por membroj 3 Fr. (Fr. 3·50). Direktoro: Dr. G. Robin. — *Gabelsberger,* internacia stenografia gazeto, org. de Int. St. Ligo „Gab.“ Red. Dr. Schramm, Dresden 20. (esp. 8 pĝ). *Stenografia Aldono* red. de K. Wallon, Frankfurt a. M. (4 pĝ.). — *La Movado, (Esperanto-Nouvelles),* monata gazeto por propagando, informo kaj komerco. Red. adm.: Paris, 31. bd. St. Marcel. (Grandformata, 12 pĝ.). Jare fremdlande Fr. 2·75. (Tre rekomendinda por lernantoj de franca lingvo). — *Cuba Esperantisto,* monata of. org. de la Sociedad Cubana para la propagación del Esperanto. Direktoro: Ant. Aleman Ruiz, Habana. — *Itala Esperantisto,* dumonata org. de la Grupo Esp. de Palermo. Jare Sm 1·20 (K 2·90) (12 pĝ. 17 × 23). — *Fervoja Esperantisto,* dumonata esp. gazeto. Org. de la Int. Asocio de la Esp. Fervojoficistoj. Red. M. Bontemps, staciestro en Parennes (Sarthe) Francujo. Jare 1 Sm (8 pĝ. 16 × 24). — *Laborista Esperantisto,* monata org. de la Ĝen. Haga Esp. Lab. Klubo. Red. adm. R. Coromans, Falckstraat 175. Haag, Nederlando. Jare 75 ctm. (Grandformata; flandre esp.). — *La Dek-Sepa,* monata bulteno por membroj de la Esp. sekcio en la XVII. pariza kvartalo. Red. Adm. H. de Coppet. Jare 1 Fr. (8 pĝ.; france, esp.).

Möller & Borel, Berlin, S. W. Lindenstr. 18/19.:

Esperantista Poŝkalendaro 1911, redaktita de prof. dr. S. Lederer (192 pĝ. 10·5 × 16). Prezo K 1·20. Jam en la lastaj kajeroj ni parolis pri la reapero de tiu ĉi utila manlibro, kiu dum la tri unuaj jaroj ĉiam estis elvendita: Certe la plej bona rekomendo. Precipe valora estas la listo de ĉiuj grupoj kaj konsuloj; tiun niaj korespondantoj precipe ŝatos. Portreto de Van der Biest-Andelhof el Antwerpen ornamas la rekomendindan verkon. Rimarkinda novajo estas la enigma konkurso kun 50 Sm da premioj. — *Esperanta Biblioteko Internacia:* n-o 13. *Bulgaraj rakontoj,* trad. At. D. Atanasov. Prezo Sm 0·10 (24 h). — N-o 14.—15. *Amoro kaj Psiĥe* de Lucius Apulejus. El la latina originalo trad. E Pfeffer. Prezo Sm 0·20 (48 h). Tre bone estas konataj ĉi tiuj poŝformataj broŝuretoj po 40—50 pĝ., kiuj por tiel malalta sumo prezentas tiom da bona teksto. Por kursoj ili estas la plej taŭgaj legolibretoj. — P. Christaller: *Deutsch-Esperanto-Wörterbuch* (515 pĝ. 11 × 16·5). Prezo 4 M., bind. M. 4·80. En antaŭparolo klarigas la aŭtoro la sistemon, kiun li uzis ĉe redaktado de la vortaro kaj donas kelkedaj praktikaj konsiloj por ĝusta trovado de terminoj. En speciala artikolo li ordigis la nove proponatajn vortojn, kiel ekz. gimnasto, meceno, nito, sekura k. a. La verko prezentas tre rimarkindan kaj valoran riĉigon de nia literaturo kaj ni esperas, ke ĝi fariĝos ankaŭ modelo kaj fonto por similaj libroj alilingvaj. La aŭtoron kaj la eldoniston ni sincere gratulas.

Presa Esperantista Societo, Paris, 33. r. Lacépède:

Du noveloj el Maŭro Jókai, el la hungara lingvo trad. Joh. de Luczenbacher (93 pĝ. 13 × 18). Prezo Fr. 1·25. En-

ĥavo: La edzino de falinto. Pola rakonto. — L i o n e l D a l s a c e: *Fatala ŝuldo*. El la franca lingvo trad. E u g é n i e F e r t e r - C e n s e (318 pĝ. 11 × 17). Prezo Fr. 3·50 (Sm 1·40). Ambaŭ nomitaj verkoj distingiĝas per flua, senerara stilo kaj precipe la unua plaĉas al ni pro sia lingva parfekteco. La interesa enhavo garantias al ili la plej grandan diskonigon.

KORESPONDANTOJ. Adresoj de fremdlandaj korespondantoj (kun speciala cito pri kiu temo aŭ kiel — per leteroj, il. kartoj k. s. — ili deziras korespondi) estas enpresataj **senpage**. Car tiu ĉi revuo ne estas tiom multe legata fremdlande kiel ĉi tie, estas publikigo de bohemaj adresoj sur tiu ĉi loko sensignifa. Al Bohemoj ni rekomendas, ke ili anoncu en esp. gazetoj en tiu lando, kie ili serĉas rilatojn. Ni atentigas, ke ne aperas plu de kelke da jaroj la adresaro de Zamenhof (la verko estus ja preskaŭ nekontrolebla pro sia amplekso). Aĉetu la nomaron de ĉiuj esp. societoj kaj delegitoj de U. E. A. (Esperantista Poŝkalendaro 1911. Prezo K 1·20) aŭ la Tutmondan Jarlibron de Centra Oficejo Esperantista (3 K). Jarlibron de U. E. A. ricevas ĉiuj membroj de tiu ĉi asocio senpage. Ĝi enhavas adresojn de mil delegitoj en ĉiuj landoj. Sendu K 1·25 al Ed. Kühnl, delegito por Praha (IL 2033) kaj vi ricevos la legitimacion de U. E. A. — *1. S-o Jos. Hermandez Carmona, *Cordoba*, H i s p a n u j o, str. Pedro Fernandese 11. — *2. S-o Manuel de Miguel Sanz, *Cordoba*, str. Lucano 29. — *3. F-ino H. Winigate, sekr. de Esp. Kl. en *Baltimore*, 3102. Presbery L. Maryland U. S. A. (il. k.; let.) — *4. S-o Carl Hoffman, *Hollins*, Virgina. U. S. A. (il. k.; let.) — *5. S-o Josef K u l i č k a, *Paris*, bd. de Courcelles 18. — *6. S-o Leo Vigodskij, *Homel*, R u s u j o (il. k.), p. m. interŝ. ĵournalojn kaj gazetojn). — *7., 8. S-oj Mardoché Malki kaj R. Eliezer, *Aïdin*, Alliance, A z i a T u r k u j o (p. m., il. k. kaj ĵurnalojn). — *9. S-o Bricet de Mamliac, *Tours*, 47. rue de Californie. F r a n c u j o. — *10. Esperantista Grupo en *Chârenton*, F r a n c u j e dez. kor. kun Bohemoj. Adr.: S-o Ferd. Courivelet, 27. rue Deterville, Altforville, Seine, Francujo. — *11. S-o Vlad. Smirnov, stud. univ. en *Kazan*, R u s u j o (lit., il k.). — *12. S-o C. H. Wandsworth, 4121. Seventh ave, *Rock Island*, Ill. U. S. A. (il. k.). — *13. S-o Jesse Mc Luise 136. Hungeshill rd. *Nottingham* A n g l u j o (il. k.; tuj resp.). — *14. 1. „Amikaro“ Esperantista Grupo de Boulogne s. Seine (dez. kor. per il. k.). Sen turni al s-o Chantaz, sekr. 11. bis. chausée du Pont.

Oficiala Jarlibro kun **Adresaro** de Bohemaj Esperantistoj-Korespondantoj aperos tuj, kiam la bezona nombro de abonantoj sendos sian adreson al kancelario de B. U. E. kun 40 hel., por kiu sumo ĉiu ricevos la broŝuron afr. La adresaro enhavos adresojn de b o h e m a j korespondantoj kaj estos dissendita al fremdlandaj societoj, kiuj trovos en ĝi rimedon por ekligi la rilatojn kun Bohemoj. (Estas vane postuli tuj la adresaron, ĝi ne povas aperi antaŭ la momento, kiam ankoraŭ 100 adresoj kolektiĝos.)

ONI PAROLAS EN ESPERANTO

ONI KORESPONDAS EN ESPERANTO.

En tiu ĉi rubriko ni presigos adresojn de firmoj, kiuj volas uzi (kaj uzas) por siaj komercaj rilatoj Esperanton. Ni petas, ke ĉiu firmo sendu al ni sian adreson. Laŭ ebleco ni ripetos ĉiam anoncojn de la firmoj, kiuj abonas nian revuon. Enpresigo **senpaga**. Samideanoj! Turniĝu ĉiam al ĉi tiuj firmoj kaj citu al ili tiun ĉi anoncon!

HORLOĜISTO: Frant. Novák — Praha I. Malé náměstí 4.
DROGISTOJ: Josef Podlipský - Smíchov, Plzeňská tř.
Jiří Havelka Žižkov, Karlova ul. 39.
Podhajský — Karlín, Mateo-Import.
MAGAZENO: „U města Paříže" — Praha I. Celetná ul.
TOLAĴO K. S. POR SINJOROJ: „Gagne Petit" — Žižkov, Karlova tř. 23.
RESTORACIOJ, KAFEJOJ: Legejo de 30 esperantaj gazetoj en kafejo „Union" — Praha I. Ferdinandova tř.
Kafejo „Palmovka" — Praha VIII. (kunvenoj esp. dimanĉon).
Restoracio „U Donátů" — Praha II., Spálená ul. (kunvenoj esp. vendredon).
Restoracio „U Grimů" — Žižkov, Husinecká ul. 6. (kunvenoj esp. vendredon).
Restoracio „Kuklovka" — Žižkov, Štítného ul. 19.
LUDILOJ: Jan Hetzl — Praha II., Karlovo nám. 26.
AŬTOMOBILO N-o 495: Posedanto Fr. Srkal, — Kr. Vinohrady, Budečská ul. 34.
AŬTOMOBILFABRIKO: F-a Walter — Smíchov, Na Zatlance.
TURISMO: Český Zemský Svaz ku povznesení návštěvy cizinců v Čechách — Praha I., Josefské nám.
BICIKLOJ, KUDROMAŜINOJ: Jar. Němeček — Praha I., Zlatnická ul. 8.
Arnošt Janečka — Vítkovice (Moravio).
INSTRUADO: A. Farník (boh., germ., france, angle, itale, hisp., esp., stenografio boh., germ., muziko) — Praha VIII.
VESTAĴOJ K. S. POR SINJORINOJ: Urban a Neff — Praha II., Václavské nám. Marianská ul.
ROBOJ POR SINJORINOJ: Marie Kopecká — Praha II., Žitná ul. 34.
KOSMETIKA LABORATORIO: Karel Kočí — Praha II., Trojanova ul. 16.
KARBO: Firmo Kotva — Praha II., Hybernská ul. 20.
LOTERIO: Kancelář loterie spolku c. k poštovních a telegr. zřízenců v zemích koruny České. Cena losu 1 K. — Praha II.
LIBROJ: F. Topič — Praha I., Ferdinandova tř.
Rašín — Praha VII., Belcrediho tř.
LANOJ, SILKOJ, ŜPINFADENOJ: Josef Roth — Praha I., Havířská ul.
AFIŜEJO, PAPERO: Jos. Najman — Smíchov, Jakubské nám.
RUBANDOJ, BEZONAĴOJ POR TAJLOROJ: Emil Pavel — Smíchov, Kinského tř. 27.
ŜTOFOJ: F. Barhoň — Smíchov, Kinského tř.
FOTOGRAFO: Atelier Eckert — Praha III., Novodvorská ul.
DENTAKVO: Dr. Ebermann — Praha II., Jungmannova tř.

Redakce Č. Č. E. žádá všechny přátele, aby jí sdělili adresy Esperantistů, jimž by mohla s úspěchem zaslati ukázkové číslo V. ročníku.

Kdo si vypůjčil v knihovně redakce Č. Č. E. jakékoliv knihy, jest žádán, aby je laskavě během měsíce února odvedl.

Redakce Č. Č. E.

Eldonanto: Ed. Kühnl. — Presejo de Národní tiskárna a nakl. JUDr. Edvard Jan Baštýř a spol. Praha.